Agadplano de Gyeongju

Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj de la Fako pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj
Gyeongju, Korea Respubliko
30 majo – 1 junio 2016

Ni, partoprenantoj el NROj en la 66-a Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj organizita de la Fako pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj, alprenas tiun ĉi Agadplanon por ke ĉiuj personoj povu realigi la aspirojn de la Tutmonda Tagordo 2030 por Daŭripova Evoluigo. Edukado estas homa rajto, esenca al bonfarto kaj digno, kaj rolas ŝlosile en realigo de Tagordo 2030. Plue, etoso de tutmonda civitaneco nepras por plenumi tiun kuraĝan, homcentran, universalan kaj planedsenteman evoluigan kadron.

Por realigi Tagordon 2030, ni konfirmas:

- La gravecon de Celo por Daŭripova Evoluigo n-ro 4: “Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj akceli tutvivajn lerneblecojn por ĉiuj.”[1]
- “Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon…”[2]
- Laŭ la spirito de tutmonda civitaneco, en kiu nia ĉefa identeco estas kiel homaj estaĵoj, ĉiuj personoj, senkonsidere pri cirkonstancoj, “devas havi aliron al tutmonaj lernadaj eblecoj kiuj helpos al ili akiri la sciojn kaj lertojn bezonatajn por ekspluati okazojn kaj plene partopreni en socio.”[3]
- La gravecon de universala inkluzivo, kun agnosko ke la foresto de difinita grupo aŭ identeco tekste povas konduki al ekskluzivo de tiu grupo aŭ identeco politike. Ni faris konscian decidon ne emfazi ajnan unuopan grupon aŭ identecon por certigi plenan inkluzivon kaj egalan traktadon de *ĉiuj* personoj – precipe tiujn en pozicioj de specifaj vundeblo kaj marĝeniĝo. Estas neakcepteble, ke membreco de diversaj grupoj aŭ identigo kun ili estas utiligata por nei la rajton lerni aŭ alimaniere marĝenigi individuojn. En edukado, kiel en ĉiuj aferoj, la fundamento de nediskriminacio estas, aŭ devus esti, nia homeco.
- Aldone al alfabeteco kaj numereco, edukado devas antaŭenigi la aferon de tutmonda civitaneco, kiu

- subtenas integran evoluigon de la tuta personon emocie, etike, intelekte, fizike, socie kaj spirite, trempitan per komprenado de niaj roloj, rajtoj kaj respondecoj por la komuna bono serve al la homaro kaj la antaŭenigo de kulturo de paco, neperforto, libereco, justeco kaj egaleco;
- enradikigas senton de zorgo pri la tero, respekto por la interdependa parenceco de ĉiuj vivospecoj, kaj kuratorecon de ĉiuj ekologiaj sistemoj por estontaj generacioj;
- plifortigas la sociajn rilatojn inter individuoj, institucioj, komunumoj, ŝtatoj, la homaro, kaj la planedo;
- “povigas lernantojn por alpreni aktivajn rolojn por fronti kaj solvi tutmondajn defiojn kaj fariĝi anticipe aktivaj kontribuantoj al pli paca, tolerema, inkluziva kaj sekura mondo”;[4]
- kultivas senton de solidareco kaj kunsentado cele al forigi malriĉecon, protekti la planedon, garantii homajn rajtojn, kaj nutri prosperajn kaj plene realigajn vivojn por ĉiuj personoj.

- La pivotan rolon kiun devas ludi la artoj, inĝenierado, humanistiko, matematiko, naturaj kaj sociaj sciencoj, kaj teknologio por katalizi novenkondukadon kaj plenumi la Tagordon 2030. Ni plue konfirmas la valoron de interdisciplina edukado kiel motoro de krea esprimo kaj novenkondukado.
- Edukado por tutmonda civitaneco estas esenca strategio por alfronti tutmondajn defiojn kaj ankaŭ antaŭenigi seksan egalecon, faciligi la elradikigon de malriĉo kaj malsato, konstrui lertojn, elimini korupton, kaj preventi perforton, inkluzive perfortan ekstremismon. Ĝi antaŭenigas vere daŭripovan produktadon kaj konsumadon, mildigante klimatŝanĝiĝon kaj ties efikojn, protektante niajn akvejojn kaj biodiversecon, kaj konservante indiĝenan scion.
- La gravecon de inkluzivo kaj partopreno de junuloj en decidojn, kiuj havas efikon al iliaj lernprocezoj, ĉar eduksistemoj havas profundan, apartan kaj daŭran efikon ĉe ili.[5]
- Lokaj scio kaj plej bonaj praktikoj estu enkorpigataj en praktikajn edukajn strategiojn por resaltemaj komunumoj kaj daŭripova agrikulturo. Specifaj celtabulaj paŝoj estu farataj por inkluzivi kaj povigi malriĉe vivantajn kamparanojn, virinojn, kaj senavantaĝaj grupoj pere de edukado. On devas doni al komunum-bazaj organizaĵoj aŭtentikan potencon kaj kapablon por prioritatigi bezonojn, selekti prjektojn, mastrumi monrimedojn, kaj ekagadi.
- Tiu ĉi renkontiĝo konstruas sian laboron surbaze de jamaj fundamenta iniciatoj, inkluzive de, sed ne limigite al, la Unesko-Forumo de 2013 pri Edukado al Tutmonda Civitanco: Pretigi Lernantojn por la Defio de la 21-a Jarcento; la Monda Konferenco de Unesko de 2014 pri Edukado por Daŭripova Evoluigo: Lerni Hodiaŭ por Daŭripoa Estontecxo; kaj la Monda Edukada Forumo de 2015: Transformi Vivojn per Edukado.

Ni dediĉas nin

- Al eduka programo bazita je krea kaj kritika pensado, kiu ebligas al *ĉiuj* homoj, ke ili aktive kontribuu al politikaj kaj evoluigaj procezoj en kompleksa, interligita kaj diversa tutmonda socio ene de kaj ekstere de iliaj propraj landlimoj.
- Al eduka programo kiu instruas konfliktosolvadon, profundan valorigon de diverseco, etikan rezonadon, seksan egalecon, homajn rajtojn kaj respondecojn, interdependon, multlingvan kaj multkulturan kompetenton, socian justecon, daŭripovan evoluigon, kaj valorojn.
- Utiligi la kolonojn de formala edukado, neformala edukado kaj trejnado, kaj rekomendado kaj publika informado kiel ilojn por redukti neegalecojn, kiuj malhelpas atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo, tute speciale Celon 4.
- Fortigi diversajn koaliciojn tra la mondo gvidatajn de civila socio, kiuj kontribuas al evoluigo de edukado por tutmonda civitaneco.[6]
- Kunlabori kun la Disvastiga Programo de Unesko pri Edukado al Tutmonda Civitaneco (UNESCO Clearinghouse on Global Citizenship Education), la Iniciato Unue Tutmonda Edukado (Global Education First Initiative: GEFI), kaj la programo de Unuiĝintaj Nacioj Akademia Efiko (United Nations Academic Imact: UNAI) dum la venontaj 12 monatoj, je kiu punkto oni pritaksos la agadon.
- Subteni Membrajn Ŝtatojn kaj Unuiĝintajn Naciojn en ties klopodoj “garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon je ĉiuj niveloj – infana, elementa, meznivela, supernivela,teknika kaj kariera trejnado.”[7]
- Akceli edukajn kapablojn por socia entreprenismo kaj kundivido de taŭgaj informaj kaj komunikaj teknologioj.

- Altigi edukan komprenadon de “tradicio” kaj “novigo” laŭ maniero kiu konservas la unikajn perspektivojn kaj principojn de ĉiu kulturo kaj konformas kun homaj rajtoj kaj tutmonda civitaneco.
- Kunlabori por elformuligi kompletan kaj koncizan difinon de tutmonda civitaneco utiligeblan en studprogramoj tra la mondo.
- Jungi strategiojn, spertojn kaj resursojn trans kiel eble plej vasta spektro de civila socio por liberigi gamon de edukaj iniciatoj kiuj garantiu inkluzivan, sekuran kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj akcelas tutviajn lerneblecojn por ĉiuj.
- Labori je la loka nivelo, engaĝante gepatrojn kaj komunumgvidantojn, por formuli planojn por enkorpigi edukadon por tutmonda civitaneco en edukajn sistemojn.
- Fortigi intergeneraciajn partnerecojn en ĉiuj aspektoj de nia laboro.
- Traduki kaj disvastigi tiun ĉi dokumenton en multoblajn lingvojn kaj realigi ĝin en diversaj kulturaj kuntekstoj.

Ni instigas Membrajn Ŝtatojn kaj Unuiĝintajn Naciojn:

- Prioritatigi edukadon en politiko kaj praktiko.
- Subteni starigon, fare de Unuiĝintaj Nacioj, de Internacia Tago de Edukado, kiu rolu kiel akcelilo de edukado por tutmonda civitaneco, lernado por civitana engaĝiĝo, kaj alfabeteco por desuba povigo.
- Liveri edukadon kiu ebligas al *ĉiuj* homoj, ke ili aktive kontribuu al politikaj kaj evoluigaj procezoj en kompleksa, interligita kaj diversa tutmonda socio.
- Ree koncepti nunajn modelojn kaj strukturojn por partopreno en decidfaraj procezoj je ĉiuj niveloj.
- Asigni pli grandan procentaĵon de publikaj enspezoj al edukado, precipe per redukto de tutmondaj militaj elspezoj.
- Liveri adekvatajn rimedojn por fronti ĉiujn el la Celoj por Daŭripova Evoluigo.
- Antaŭenige al Tagordo 2030, akceli la rajton aliri informojn. “Aliro al informoj kaj la kundivido kaj kreado de scioj signife kontribuas al fortigo de ekonomia, socia kaj kultura evoluigo, tiel helpante ĉiujn landojn, ke ili atingu la internacie interkonsentitajn evoluigajn celojn.”[8]
- Alpreni plenumajn alirojn al edukado, kiuj respektas lokajn specifaĵojn, inkluzive de politikaj, sociaj, kulturaj kaj historiaj dimensioj sen antaŭselekto.
- Pliigi daŭripovan kaj renovigeblan energion por ebligi al *ĉiuj* homoj aliron al edukado, sano, media daŭripovo kaj terglobe-amika evoluigo.
- Esplori vojojn kaj rimedojn por ebligi integrigon de edukado por tutmonda civitaneco en studprogramojn kaj la tagordon por edukado.
- Daŭrigi la gravan laboron kiun faras Unuiĝintaj Nacioj ĉi-kampe per, ekzemple, Unesko, kaj per iniciatoj kiel GEFI kaj UNAI.
- Akceli perspertan lernadon, interdisciplinajn studojn, perretan lernadon, kaj interkulturajn interŝanĝojn por formi studentojn kaj edukistojn kiel tutmondajn civitanojn.
- Elpensi kaj realigi efikajn kapablokonstruajn programojn por edukaj praktikantoj.
- Krei la postenon de Sendito de la Ĝenerala Sekretario al Civila Socio kiu agu kiel ligo inter la Oficejo de la Ĝenerala Sekretario kaj Civila Socio.

Sekve, estu decidite, ke

Ni, la kunvenintoj ĉe la 66-a Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj de la Fako pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj, daŭrigos la laboron antaŭenige al la Tagordo 2030 por Daŭripova Evoluigo kun aparta emfazo je akcelado de edukado por tutmonda civitaneco.

Ni dankas la popolon kaj Registaron de la Respubliko de Koreio, la Provincon de Gyeongsangbukdo, kaj la Urbon Gyeongju pro ilia elkora kaj varma bonvenigo kaj pro gastigo de la 66-a Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj de la Fako pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj, kaj pro iliaj klopodoj antaŭenigi edukadon por tutmonda civitaneco kaj atingi la Celojn de Unuiĝintaj Nacioj por Daŭripova Evoluigo.

---

1 UN General Assembly, *Transforming our world: the 2030 Agenda for Sustainable Development*, 21 October 2015, A/70/L.1

2 Ĝenerala Asembleo de UN, Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, Art. 26, 1948.

3 UN General Assembly, *Transforming our world*, Para. 25.

4 UNESCO, Global citizenship education: Preparing learners for the challenges of the twenty-first century, 2014.

5 Vidu la Junularan Deklaracion de la 66-a Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj de la Fako pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj, 2016.

6 Ili inkluzivas, inter aliaj, la Koalicion por Tutmonda Civitaneco 2030 bazita en Nord-Ameriko, Ponto47 (Bridge47) bazita en Eŭropo, kaj aliajn.

7 UN General Assembly, *Transforming our world*, Para. 25.

8 Rezultara Dokumento de la Monda Pintkonferenco pri la Informa Socio, 2015, Para. 10.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041